# Ĉirkaŭ *Pola Radio*

## 3. SPECIMENAJ ELTIRAĴOJ

## 3.5. Pola literatura Nobel-premiitino - Wisława SZYMBORSKA

(Ekzerco por aŭskulta kompreno)

Taskoj:

***1) Bonvolu aŭskulti la sonmaterialon, elŝuteblan je la sekvaj adresoj:***
a) en formato MP3:

http://perso.wanadoo.fr/kursoj/edukado.net/ed_pr04.mp3

aŭ

b) en formato RealAudio:
http://perso.wanadoo.fr/kursoj/edukado.net/ed_pr04.rm

***2) Bonvolu rigardi la subajn demandojn kaj poste denove aŭskulti la elsendaĵojn. Post tio provu respondi al la demandoj***:

1. Citu la kvar ĝisnunajn polajn nobelpremiitojn pri literaturo.
2. Kion vi scias pri Nobel-premio? Kiujn branĉojn ĝi havas, kiuj ĝin asignas ktp?
3. Klarigu: « la du unuaj volumoj estis provo koketi socrealismon ».
4. Kiel eblas karakterizi la mondopercepton de W. Szymborska?
5. Kiel ŝia propra historio influis ŝian verkon?
6. Kiom grava estas ŝia poleco por ŝia kreado?

***3) Kaze de neklareco vi trovas ĉi-sube la skribitan tekston***:

Wisława Szymborska de jaroj per sia kreado ravas la poezi-ŝatantojn en Pollando, sed la mondo aŭdis pri ŝi iom pli vaste nur en la 1996-a jaro. Tiam ŝi ricevis pro sia originala, kvankam ne tre abunda verkaro, literaturan Nobel-premion. Tiel Szymborska fariĝis la kvara polo distingita per tiu granda literatura premio, kaj la dua pola poeto. Antaŭe la literaturajn Nobel-premiojn ricevis Henryk Sienkiewicz (relative frue, ĉar en la 1905-a — Nobel-premio entute estis fondita en la 1895-a), sekve literaturan Nobel-premion ricevis Władysław Reymont kaj Czesław Miłosz.

En Pollando Wisława Szymborska estas nun kalkulata al la plej eminentaj poetoj, sed ankaŭ al la plej bone perceptataj. La poeziaĵoj de Szymborska

karakteriziĝas per intelekta alrigardo al la problemoj de la mondo, kies realo devas esti objektive traktata, malsame ol la sentoj subjektivaj.

Wisława Szymborska naskiĝis en la 1923-a jaro proksime de Poznano, sed kiel 8-jaraĝa infano ŝi ekloĝis en Krakovo. Ne mirige, ke nun ŝi estas honora civitano de la malnova ĉefurbo de Pollando. Ŝi faris maturecekzamenon dum la Dua Mondmilito en konspira lernejo. Poste ŝi studis la polan filologion kaj sociologion en la Jagellona Universitato. Sian unuan poeziaĵon Szymborska publikigis en la 1945-a jaro en la krakova ĵurnalo „Pola Taggazeto”, sed kiel ŝi konfesas, pri la poeziverkado ŝi okupiĝas ekde frua infanaĝo. Jen ŝia ĉi-koncerna deklaro: „Jam kiel infano mi verkis poeziaĵetojn. Ili estis amuzaj kaj malrutinaj, kaj kiam mi iom sukcesis, mia patro kutimis donaci al mi kelkajn groŝojn. Mi aĉetadis kontraŭ ili aĉgustajn bombonojn”.

Ĝis hodiaŭ – do en la daŭro de sia 80-jara vivo – Wisława Szymborska publikigis naŭ poezi-volumetojn i.a. "Demandoj starigitaj al si mem", "Voko al *Yeti*", "Fino kaj komenco". La poetino distanciĝas disde du unuaj volumoj, kiuj estis provo koketi socrealismon. Krom la poeziverkado Szymborska verkas felietonojn kaj okupiĝas pri la poŝtkart-farado. La poŝtkartoj estas apartaj – nome ili estas faritaj laŭ la tekniko de la surgluataj paperpecetoj, kiuj formas ornamon. Ilin kiel donacojn ricevas la amikoj de Szymborska. Nobel-premio kronis ŝian verkistan laboron, sed samtempe Szymborska estas laŭreatino de multaj polaj kaj eksterlandaj premioj, ŝi estas ankaŭ membro de la usona Akademio de la Arto kaj Literaturo.

Individuismo de Szymborska sekvas el ŝia historia kaj morala sperto, kiu estas la komuna sperto de ŝia generacio kaj de laŭvicaj generacioj [de poloj] ĝis la 90-aj jaroj. La poetino ekstaras flanke de individuo, damaĝita de ideologio kaj civilizacio. La mondopercepton la poetino komencas per objektoj kaj aferoj ĉiutagaj, ordinaraj, eĉ malgravaj. Szymborska ne instruas, ne konvinkas, ke poezio povas ŝanĝi la mondon. Ŝi klopodas montri, ke profunda pensado, rezonado pri ekzistantaj objektoj estas ebla kaj komenciĝas per alrigardo de tio, kio estas la plej proksima. Demandita, ĉu en ŝia kreado estas grava ŝia poleco, Wisława Szymborska respondis: „Evidente, tio havas por mi signifon. Sed samtempe mi sentas min eŭropanino kaj tre interesas min ĉiuj ekstereŭropaj nacioj. Mi vivas ne nur per la pola sorto, kiu evidente estas por mi la plej proksima, sed daŭre mi pensas pri tio, kio okazas en la mondo”.

Eble tio kaŭzis, ke Wisława Szymborska estas volonte legata ne nur en Pollando. (2003-07-18)

Gabi KOSIARSKA

**Daŭrigota.** Serĉu la sekvan parton!
Ni esperas, ke vi **ne bezonas** la solvojn! Se tamen, petu ilin ĉe redaktanto@edukado.net.